# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-30 sendita el Budapeŝto la 30an de julio


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO finfine survojas al ĉeestaj eventoj

Kulturo estas la temo de la jubilea 75a seminario. Kulturo laŭdifine estas socia fenomeno, eĉ solartisto bezonas spektantojn, aŭskultantojn, publikon. Same, la fizika kunesto gravas por la AMO-seminarioj. Unuafoje depost januaro 2020, ni okazigis seminarion kun pli da surlokaj partoprenantoj (ĉ. 30) ol da virtualaj partoprenantoj (nur 7). Tio ne estas miriga, la ĵusa VK2 kaj troabundo de pliaj virtualaj elektebloj plene elĉerpis la zomemon de la plimulto de nia devige diaspora komunumo. Tamen, la AMO-programo multon lernis el la 18-monata virtuala periodo: seminarioj estonte hibridos, per kombino de surlokuloj kaj virtualuloj.

# AMO 75 en 27a de julio




AMO 75 malfermiĝis en tiu mardo per la jam dissendita enkonduko (vidu ĉe EKO 24), kiu resumas, ĉefe en bilda formo, la buntecon de la kultura vivo en Esperanto. Sekvis Renée Triolle (en la foto ŝi salutas la jubilean kongreson en Lillo, 2015) , multjara aktivulo de UEA kun la temo ''Esperanto – ĉu kaŝita interkulturilo?'. Ŝi montris, kiel ŝi iom post iom malkovris la veran potencialon de kontaktoj fareblaj pere de Esperanto. Ŝi emfazas la rolon de Unesko kaj la eldonan laboron de UEA kune kun Unesko, ekzemple per gravaj literaturaj ĉefceloj ene de la multjara programo de UEA 'Okcidento-Oriento'. Ŝi citis du esencajn deklarojn de Unesko: "La kultura diverseco estas same necesa al la homaro kiel biodiverseco al la naturo", emfazante plie la rajton de unuopuloj esprimi sin per propra aŭ memelektita lingvo. Ŝi donis multajn ekzemplojn pri interkulturaj konoj, aŭ iliaj mankoj.



Sekvis Francois Lo Jacomo, ŝlosila aganto pri la Kulturcentro Greziljono, kun la temo: 'Esperanto-kulturo aŭ kulturo pere de Esperanto'. Skizinte la historion pri la klopodoj rajtigi Esperanton por la abiturienta ekzameno, li atentigis, ke reliefigo de la Esperanto-kulturo (ekzemple per taskoj pri kulturo en Esperanto-

ekzamenoj de ILEI kaj franca FEI, sen vera instruprogramo) utilas grandparte por rebati la argumenton, ke Esperanto ne estas same kultura kiel la lingvoj instruataj en la lernejoj. Tiu ĉi argumento, valida komence de la dudeka jarcento, ja ne plu validas nun, des malpli post akcepto de la Komuna Eŭropa Referenckadro pri Lingvoj kiel oficiala mezurilo de la lingva nivelo tute sendepende de iu ajn kultura kono. Tamen, la ĉefa celo de Esperanto ne estas disvastigi sian propran kulturon, sed malfermi la pordon al aliaj kulturoj per pli aŭskultema maniero dialogi.

La lasta prelego de la tago venis el Rusio, kun la temo 'Libroeldonado' nesuprize prezentita de la teamo de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, gvidantoj de la eldonejo 'Impeto'. Ili

diris tion, kion ni ĉiuj scias, ke la merkato por fizikaj libroj ege ŝrumpas kaj profitoj por eldonado de fizikaj libroj ne plu estas. Plie la loĝistiko por la distribuado de fizikaj libroj krevis, nelaste pro la pandemio. Kreskas la rolo de retlibroj kaj prosperas tiuj eldonistoj, kiuj majstris la arton. Tion certe faris 'Impeto' – konstatu mem la mirindan kolekton de senpage elŝuteblaj libroj ĉe <impeto.trovu.com/prozo>, la plimulto same akireblas en fizika formo.

Entute valora tago, kun altnivelaj kointribuoj.

# AMO 75 en la 29a de julio



La unua programero de la tago estis de Małgosia Komarnicka, PL: 'Esperanto en neesperantista medio – agoj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado'. Ŝi skizis kun abunda ilustrado la plej diversajn agadojn de tiu centro. Tio inkluzivis serion de kvin simpozioj, la lastaj kunlabore kun la Universitato de Vroclavo kaj la naŭ Kantfestivaloj realigitaj, kiuj enplektas artistojn kaj publikon en ĉiuj aĝgrupoj. La infanaj kantgrupoj vere iĝas 'ambasadoroj de Esperanto' ĉar ili, lerninte kantojn en Esperanto, ripetas ilin en aliaj prezentaĵoj.



La dua programero venis de Ilona Koutny, kiu surlokis en Greziljono por gvidi kursojn pri lingvo kaj kulturo. Ŝia temo: 'Esperanta kulturo kaj ĝia instruado', kiun ŝi longtempe praktikas en la universitatoj de Budapeŝto kaj Poznano. Jen resumo de diversaj artformoj: arkitekturo, skulpturo, pentrarto, aplikataj artoj, literaturo, teatro, filmo, muziko, kantado, dancado, kaj ilian aperon en Esperanto. Ŝi skizis la elementojn de la ĉiutaga kulturo de simboloj, e-centroj tra eventoj kaj konataj homoj ĝis la pensmaniero kaj valoroj, krome emfazis la ligitecon de kulturo kaj lingvo. Tion sekvis, kiun kulturan kampon kiam kaj kiel ni instruu, de la esprimado de ĝentilaĵoj tra kulture ŝarĝitaj elementoj ĝis muziko.

La plena teksto de ĉi tiuj prelegoj iom post iom estos dissenditaj alkroĉe al EKO-komunikoj, kaj post AMO 76 ekaperos en la retejo <aktivulo.net>

La lasta pritema prezentaĵo estis de s-ino Laure Patas d'Illiers el Francio: 'Sciencfikcio kaj Esperanto'. Sciencfikcio ekzistas de jarcentoj, kaj temas ege pri fantazio kaj alternativaj realecoj. Sciencfikcio povas trakti filozofiajn temojn: robotojn, eksterteranojn, rilatojn kun bestoj, klonado kaj lastatempe klimataj minacoj. Resume, la artformo traktas la timojn de la homaro en la koncerna tempo. Inter la verkoj tradukitaj al Esperanto estas tiuj de J. Verne,

H.G. Wells, I. Asimov, M. Shelley, K. Čapek, S. Szathmári kaj S. Lem (‘Solaris’ aperonta. Inter originalaj verkintoj estas Koniŝi G., Nemere I., Dudich E. kaj J. Sigmond kaj S. Rodin.



La tago venis al fino per prezento pri la sepjara historio de la AMO-programo de seminario 1 ĝis 75 (pretigis SMG – la prezentaĵo disiris kun EKO 27 sub la titolo ‘AMO de 2014 ĝis Oceanio’). Tutfine okazis mallonga eblo por diskutado, en kiu estis dirita la bedaŭro, ke ne povis okazi pli da diskutado. Ni konstatas, ke la tuta hodiaŭa pritema programo estis en la prizorgo de virinoj, kaj en la tuta dutaga seminario 4 kaj duono el la 6 prezentintoj estas virinoj. Kredeble tia figurado de virinoj unuafoje okazis en la AMO-seminario.  Ni dankegas al ĉiu kontribuinto kaj partoprenintoj.




## Kandidatoj por la nova estraro de TEJO

La elektoj okazos ene de la IJK komence de aŭgusto.

Kandidatoj por la posteno de **Prezidanto**: Léon KAMENICKÝ
Kandidatoj por la posteno de **Kasisto**: Veronika VENISLOVAS
Kandidatoj por la posteno de **Ĝenerala Sekretario**: Rogier HUURMAN (Roĉjo)
Kandidatoj por la posteno de **Vicprezidanto**: Inès KAHIN, Abel Johannes (Joop) KIEFTE, Albert Stalin TANCINGO GARRIDO
Kandidatoj por **senofica estraraneco**: Inès KAHIN, Abel Johannes (Joop) KIEFTE, Albert Stalin TANCINCO GARRIDO, Matheus ARANTES PACHECO, Cyprien GUIYA, Uriel GURDIÁN, Alexandre RAYMOND (Alekĉjo), Valentin CERETTO-BERGERAT



## Nefumantoj de la Eo-mondo delonge unuiĝis



Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj – TADEN
Prezidanto: Jan Bemelemans: jan.bemelmans2@gmail.com (kaj vizaĝlibro)
Sekretario-kasisto: Rob Moerbeek: moerbeekr@gmail.com
Jarkotizo: 5 eŭroj (A-landoj); 3,50 eŭroj (B-landoj). UEA-konto: tade-t.
Organo: Puraj Pulmoj.

TADEN ĝuis kelkajn okazojn montri sin kadre de VK2 – kiel simile faris deko de pliaj fakaj asocioj. La redaktoro de “Fenikso”, la organo de Esperanto Nederland, demandis ĉuTADEN pli havas ekzistokialon, nun kiam la tuta (SMG: nederlanda!) socio jam opinias fumadon nenorma. Nu, jam la mortokvanto pro fumado, po 20 000 jare en Nederlando kaj eble 5 milionoj tutmonde, montras, ke restas laboro por atingi liberigon de fumĝeno. mopacientoj (post ilia konsento: ili spontane avertas, sentante sin socie utilaj.

## Rikolto el la Virtuala Kongreso pri kantado

youtu.be/WhU6ESi83O8

Saluton! La duopo Dudekses gajnis la unuan premion pro la Esperanto-versio de la kanto "Homura" en la talento-konkurso Mondovizio 2021, kiu okazis dum la 2-a Virtuala Kongreso de #Esperanto. Gratulon! Ili bele reprezentas Argentinon! Kaj omaĝas la japanan kulturon. Tre mondovizia! :)

Mi invitas al ĉiuj ĝui!




=== vortoj: 1200 ====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean





**ENHAVO**


- AMO 75
- Du tagoj da diskuto
- Kulturo en la fokuso
- TEJO renovigas sin
- Nefumantoj spiras
- Monda Vizio